# *Kubo rifuzas la unuflankan deklaron de Usono kontra? la palestina popolo*




Havano, 7 dec (RHK) La ministerio pri eksteraj rilatoj de Kubo publikigis oficialan deklaron per kiu esprimas profundan zorgon kaj rifuzon pro la unuflanka deklaro de la usona prezidento Donald Trump akcepti Jerusalemon kiel ?efurbon de Israelo, kio konsistigas gravan kaj malferman perforton de la ?arto de UN, la internacian juron kaj la koncernajn rezoluciojn de UN.

Tiu ?i klopodo de Usono modifi la historian statuson de Jerusalemo dama?as la legitimajn interesojn de la palestina popolo kaj la arabaj kaj islamaj landoj, provokos tiklajn sekvojn por la regiona stabileco kaj la sekureco en Mezoriento, pliigos la stre?ojn en la regiono kaj malhelpos ajnan strebon por renovigi la pacan dialogon inter israeloj kaj palestinoj.

Kubo alvokas la Nacian Konsilantaron plenumi la respondecon kiun ?i ricevis de la ?arto de UN en la pacaj celoj kaj internacia sekureco, adopti la necesajn decidojn kaj postuli al Israelo la tujan ?eson de la okupado de la palestinaj teritorioj kaj la agresajn politikojj kaj koloniigajn praktikojn, samkiel plenumon de la rezolucioj aprobitaj de tiu organo pri la situacio en Mezoriento, inkluzive de la temo palestina.

La kuba ministerio pri eksteraj rilatoj  ratifas ke Kubo da?re subtenos solvon vastan, justan kaj longda?ran por la konflikto israelo-palestina, surbaze de unu solvo de du ?tatoj, kiu ebligu al la palestinanoj la rajton je libera memdetermino kaj disponi je sendependa kaj suverena ?tato, kun sia ?efurbo en Jerusalemo Orienta kaj la landlimoj anta?aj al 1967.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/149639-kubo-rifuzas-la-unuflankan-deklaron-de-usono-kontrau-la-palestina-popolo

**Radio Habana Cuba**